

Franz Freiherr von Dingelstedt,

## Ĉe la Weser

*tradukita de H. W. Funk*

Jam ofte sidadis mi tie ĉi  
 Kun mia liuto, kantante;  
 En valon profunden rigardis mi,  
 Pri mond', pri mi mem forgesante.

Kaj sonis muziko majeste en rond',  
 Kaj super mi lumis lazuro;  
 Malsupre arĝente brilegis la ond'  
 De l' Weser kun brua murmuro. —

Kaj kiel el buŝo de amatin'  
 Tra l'arboj sonetis kantaĵoj;  
 El fundo de l'valo salutis min  
 Plej belaj, plej ĉarmaj revaĵoj.

Kaj sonis muziko majeste en rond',  
 Kaj super mi lumis lazuro;  
 Malsupre arĝente brilegis la ond'  
 De l'Weser kun brua murmuro. —

Denove mi sidas nun tie ĉi,  
 Sopiron en koro mi tenas;  
 Aŭdiĝas ne plu la melodi',  
 La revoj neniam revenas.

...

La bildoj, la belaj, nun estas for, —  
Ĉielo sen luma ornamo. . .  
Adiaŭ, beltempo, iama trezor',  
Adiaŭ, ho revoj de l'amo!

*Traduko de la Germana poemo "An der Weser" de FRANZ FREIHERR VON DINGELSTEDT (\*1814-06.30 – †1881-05-15) en Esperanton de H. W. Funk.*

*Arg-424-1387 (2012-12-13 11:33:32)*

*Tiu ĉi poem-traduko estas trovebla en [http://kantaro.ikso.net/das\\_deutsche\\_lied\\_in\\_esperanto](http://kantaro.ikso.net/das_deutsche_lied_in_esperanto), pli precize en [http://kantaro.ikso.net/cxe\\_la\\_vezero](http://kantaro.ikso.net/cxe_la_vezero). Ĝi aperis unue en la kant-libro "Das deutsche Lied in Esperanto", eldonita en 1921 de Friedrich Pillath.*